

Popolara Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŝISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA VALENCIA (Hispanio)
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25



Centraj figuroj de la komitata ludo: Delbos, Majski, Eden, Grandi kaj Ribbentrop

DEKADENCO DE EŬROPO

La eŭropa horloĝo ne montras agrablan horon por la sentoj de justeco. Ankoraŭ estas pli peza la cinika babilado de la Londona Komitato ol la tragikaj realoj en Hispanio. Sen ia dubo, oni povas jam imagi, ke Eŭropo marŝas al la barbareco — al la senhonoreco! — per tiel rapida paŝo, kiel nia Respubliko flugas al la gloro. Laŭ ia maniero, la fiero de Hispanio estas nun ne plu simili jam al Eŭropo...

Ni petas pardonon, pro nia konkludo, al ĉiuj bonaj amikoj de la vero, kiuj, malgraŭ sia eŭropaneco, koincidas kun nia malŝato por la intrigoj de kruela maŝkuraĝo; intrigoj, kiuj parade sinsekvas kontraŭ la nefleksebla hispana popolo. Vilhelmo Ferrero, ekzemple, saĝa cerbo universala, demisias, kiel membro de almozema demokratio, amare dirante: «Eŭropo atingos sian lastan gradon de intelekta k morala dekadenco, se ĝi ne konscias kompreni la monstraĵon, kiu furiozas en Hispanio jam pli ol unu jaron!» Certe, ekzistas kaŝitaj fortoj, kiuj makleras, pri la vivo de hispanoj, kvazaŭ pri malkaraj varoj. La agente plej videbla estas Mussolini; sed almenaŭ Mussolini havas la sincerecon de sia cinikismo k la virton de sia aŭdaco. Li inventis doktrinon, pri malobeo al la normalaj reguloj de korekta internacia kunvivado, k li aplikas siajn sovaĝajn normojn sen peti permeson al la ceteraj ŝtatoj. Tiaokaze, kio vere haladzas, estas la platona influo, en Eŭropo, de potencaj nacioj — sin nomantaj bastionoj de justeco k rajto por la paco — kiuj taŭgas, hontinde, nur por ludi rolon de helpantoj en la terura ludo, kiun preparas, por la tuta mondo, la despotoj. Tiu ĉi konsidero tuŝas la problemon scii kiaj estas pli dangeraj malamikoj de nia popolo: Ĉu la malamikoj sen vualoj, aŭ tiuj amikoj, kiuj kompleksas la malamikojn? Laŭ nia opinio, tiuj lastaj estas pli malutilaj ol la aliaj. Ambaŭ elementoj fripone spekuladas je la leĝa ekzisto de Hispanio, sen agnosko por la morala respekto, kiun meritigas digna, libera k laborema popolo. Ni fidus nur jam en nia propra kuraĝo.

La tempo flugas; la supozo pri la retiriĝo de la «volontuloj» estas fantazio por naivuloj. Oni devas unue retiri la emon al la fikcio en la kancelarioj. Se estas ministroj, kiuj imagas malproksimigi la militon de sia lando, per renverso de la sendependeco de Hispanio, ili eraras de ekstremo al ekstremo. Antaŭ ol fariĝi adepto de la pereismo, nia lando kalkulas je drastaj rimedoj, bruligontaj eksterordinarajn k ege dangerajn situaciojn. Eble, neniu pensas uzadi tion ankoraŭ; sed, certe, sen hezito, oni uzadus ĉion en puŝo de lasta bezono. Hispanio, nacia korpo, estas preta agi kiel ŝiegata leono; ĝi rezervas por lasta horo sian plej imponan saltegon, sian plej ŝirantan ungobaton.

Kiu hejme suferas, kiel ni, rigoran militon nutritan de nacioj, kiuj neniel ricevis ofendojn niaflanke, tiu ne povas stulte akcepti ŝafan pereon por ne okazigi ĝenojn al la najbaro; ne, tute nel Se oni ne atentis pri nia rajto, tio signifas, per si mem, ke oni permesas pri nia venĝo. Jes, reliefa venĝo, sen la deca pasamento, kiun ni ĉiam aplikis al niaj internaciaj rilatoj. Al la aŭdaco ni respondos per aŭdaco, laŭ eblo de nia provizo, kiu feliĉe ankoraŭ ne elĉerpigis. Al provoko per provoko. Al egoismo per egoismo, ĉar ni volas esti kapablaj lernantoj pri la leciono, kiun instruas Eŭropo okaze de nia milito!

BAGATELO

Kiam ankoraŭ flirtas la flagoj, en honoro al Madrido pro ĝia glora datreveno, ni oferas la pompon de poluritaj flagoj k elektitaj vortoj. La aŭtuno estas plej adekvata kadro por la emocioj de delikata koro, kiu plenumas sian rolon batadi normale, per trankvila iremo, dum la Historio kolektas decidajn ĉapitrojn de la moderna epoko.

Oni devas rakonti ankaŭ, por intima ĝuo aŭ ĉies instruo, kelkajn ŝajne sensignifajn epizodojn el la epopeo de Madrido. Sen hipokritaj gestoj de falsa modesteco, la violo estas floro. Ekster la ekrano restas valoraj scenoj. Tiuj simplaj scenoj, kiuj okazas sen scio de atentema kompilanto. Tiuj detaloj, malpli imponaj ol tiuj aliaj incidentoj ĉe la frontoj, estas aferoj malpli patosaj ol tondro de kanonpafo, sed ili estas nuancoj pli konformaj kun la vivo, kun la karno aŭ kun la sentoj de ĉiu bona homo.

Jen ĉio: Unu virino, loĝanta en kvartalo el Madrido, en laborista strato kie falis k falsas multaj obusoj, skribis leteron, antaŭ kelkaj tagoj, al iu konato nia. Ŝi surpaperigis serene k senafekte jenajn frazojn:

«En mia domo jam falis sep pilkoj; vi eble demandas kial mi ne translokiĝas al alia pli luksa moderna kvartalo... sed fakte estas, ke tie ankaŭ pluvas...»

Ni ne volas, kiel promesite, elvortarigi brilajn adjektivojn por laŭde prezenti la figuron de tiu madridanino, kiu resintie tie, apud la fajro, parolas kun ironia tono pri la krimaj agoj de la malamiko.

Jen, ŝi estas virino, unu el multaj, kun natura antifaŝista ideologio, sen difinita tendenco. Tamen, ŝi, kiel virino fekunda, krom hispanino, ankaŭ estas patrino. Tial ŝi havas alian motivon por restadi tie. Motivo por kiu ne taŭgas flamaĵ diskursoj sed nur mildaj larmoj. Motivo malnova k universala, supera k grandioza, alkreita en ŝia karno, en ŝiaj pensoj k en ŝia dormo. Motivo elementa, varma k definitiva: Ŝia filo — unika filo! — batalas en la fronto, ĉe sektoro de la Centro. Tial ŝi obatine restas en Madrido, ĉar ŝia domo, malgraŭ la obusoj... kuŝas tiom proksime de ili...

Bagatelo — nia bagatelo — estas hodiaŭ grava substantivo por ornamo ĉefan paĝon!

ĈU NE?

Se vi estas socialisto ne estas necese rekomendi al vi la legadon de la instrua gazeto

LA SOCIALISTO

**ORGANO DE LA INTERNACIO DE
SOCIALISTAJ ESPERANTISTOJ (I.S.E.)**

Aperas dumonate - - Abono: 4 numeroj Hfl. aŭ egalvaloro

**Administracio:
LA SOCIALISTO**Jan Kobellstraat 41. ROTTERDAM W
NEDERLANDO

LA FARSO DAŬRAS

Verŝajne, du internaciaj komisionoj baldaŭ venos en Hispanion. Unu el ili trairos la faŝistan zonon dum la alia vizitos la lojalan teritorion. Ambaŭ faros enketon pri la eksterlandanoj batalantaj en ĉiu parto de la lando k preparos ilian ellandigon. La gravuloj de Londono, la famaj komitatanoj, faros statistikon, kiu nepre havos kiel bazon la ciferojn donatajn de la Respublika Registaro k de la ribelinta Estraro al la enketantoj. Kompreneble, nia registaro diros, kiel ĉiam, la veron dum la frankistoj mensogos, kiel kutime, ĉar la konstanta mensogado konsistigas la akson de ilia politiko.

Ekzemple, s-ro. Grandi, reprezentanto de la itala diktatoro diris en Londono, ke deĵoras en Hispanio 40.000 italaj «volontuloj». Tamen, okaze de la itala malvenko en Gvadalaharo, Mussolini per siaj radiogramoj, k la Granda Faŝista Konsilantaro per siaj oficialaj salutdepeŝoj, agnoskis la ekziston tiam de 50.000. Tio ja okazis en monato Marto. Nun estas Novembro. Intertempe, dum lastaj printempo, somero k aŭtuno, ne ĉesis la elsipiĝo de italaj kontingentoj en la metropolajn havenojn de Hispanio k en la maroka marbordo. Tion tre bone scias Londono k Parizo. Nuntage estas en nia lando pli ol 100.000 italaj soldatoj, komandataj de dekdu aŭ dek-kvar samlandaj generaloj. Krome, ĉirkaŭ 20.000 germanoj k proksimume 15.000 legianoj portugalaj, francaj, aŭstraj, rumanaj, hungaraj k. t. p. Oni aldonu fine 40.000 maŭrojn, kiel «naciajn» soldatojn.

FORGESITA INTERKONSENTO

Kun subskribo de franca deputito Gabriel Peri, en Pariza gazeto aperas artikolo, el kiu ni ĉerpas jenan parton:

«Dum sufiĉe da tempo ni ŝancelis memorigi pri incidento okazinta en privata kunsido de tiu Komitato, kiu en Genevo preparis la rezolucion rilate al hispana problemo. La reprezentantoj de Francio k Anglio penis konvinki al hispana delegito Del Vayo ke li ne estu tro postulema, ĉar ili deziris ne endangerigi la lastan demandon, kiun ili estis tuj farontaj al Mussolini.

La hispana delegito demandis al Delbos kiajn estis la intencoj de Francio, k la franca ministro respondis: «Mi petas al Italio ke ĝi respondu al nia demando, kiu estos la lasta. Poste, se la respondo ne estas favora, ni denove konsideros la problemon k malfarmos la landlimon ĉe la Pirineoj». Tiam Del Vayo demandis: Dum kiom da tagoj vi estas pretaj atendi la respondon de Italio? Kiom da tempo vi bezonas por tiu celo?»

Delbos respondis: «Tio nur daŭros malmulte da tempo». Del Vayo demandis: «Kion vi opinias *malmulte da tempo*?» Delbos asertis: «Pleje, dek tagojn».

La angla delegito, kiu ĉeestis, aprobis la asertojn de la franca ministro. Tiu konversacio okazis la jaudon 30. de Septembro, ĝi estis aŭskultata de kelkaj ĉeestantoj. La franca ministro formale rifuzis la eblon pri

alia arango; li rifuzis partoprenon de Londona Komitato k fiksis por la 10. de Oktobro la finon de la komedio.»

Del Vayo komunikis tion al hispana registaro k ni estas jam... en Novembro.

Cu la promesoj de franca ministro ne validas respondeci la francan registaron? De kiam Francio ne honorigas siajn formalajn promesojn? Eble nur Anglio povos respondi.

NI REZIGNAS PRI ĈIO, ESCEPTE PRI LA VENKO!

La ĉefa organo de C. N. T., *Solidaridad Obrera* el Barcelono, la 10. Novembro 1937. aperigis, apud portreto de Durruti, belegan k instruan artikolon, kiun ni, tre plezure, komplete tradukas. Modelo ĝi estas de anarkista honesteco:

«Li parolis por ĉiuj, esprimante, per majstra sintezo, la penson de larga amasa movado, kiu estas resumo de la plej fervora sindonemo. Li parolis metante en siaj lipoj la acidon de la vero. De tiu vero, kiu ne havas etiketon, koloron de partio nek odoron de sekto. Kun kora krudeco, firma konvinko, elstara volo k rigida karaktero, sen ĉirkaŭfrazoj, kun alspiro por triumfo grandioza, li diris:

NI REZIGNAS PRI ĈIO, ESCEPTE PRI LA VENKO!»

Ĉio ĉi estas la ŝtormtrupoj de Franko. Dank'al ili k al la abundega militmaterialo, provizita de Germanio k Italio, povis Franko en sep monatoj de eksterma milito, konkeri Baskion, Santander k Asturion, kiujn la Respubliko—pro geografiaj baroj—ne povis helpalkuri efike.

* * *

Venos la nomitaj komisionoj. Ili englutos la oficialan veron, kiu estos tute hela niaflanke k mizera falsaĵo ĉe la frankista kampo. Poste, la enketantoj reiros al Londono k tie la diskutado rekomenciĝos.

Tiu procedo estas maksimume prokrastiga. Ree Mussolini k lia germana kunulo sukcesis gajni tempon. Ili esperas, ke Franko pere de iliaj militrimedoj, malavare sendataj, povos atingi gravajn venkojn en la orienta, suda k centra frontoj. Tiucele oni konsideras nepre necese, ke la franca landlimo kun Katalunio restu ŝlosata, por ke Hispanio elportu plue rigoran blokadon.

Ĉiuj francaj malpacienoj dum Septembro jam tute formalaperis. Hispanio, la sole vera Hispanio, tiu kiu luktas ne nur por si sed por la universala Demokratio, pludaŭrigos sian sangverŝadon...

Ĉu absurde? Ĉu hontinde? Ja jes, sed certe tiel. Tia estas la efiko de la sinteno de registaroj k popoloj sin nomantaj «demokrataj». Sed tutcerte ili pagos, per sangaj larmoj, sian malkuraĝon k sian egoismon, kiuj ne povas resti senpunaĵ, kiam ili sin vidos atakataj de la nunaj perversaj buĉistoj de nia popolo.



Jen unu internacia volontulo el niaj Brigadoj! Lia pensema mieno esprimas impreson la ardan konvinkon, kiu brulas post lia nobla frunto. Vera volontulo li estas, ĉar libere li venis defendi justecon, sen ulla ordono krom tiu de ulla idealo. Nur plej eta detalo, en la mieno, de tiu anonima kamarado valoras ja multe pli ol ĉiuj ŝablonaĵ vizagaĵoj de ĉiuj malfeliĉaj «volontuloj» en faŝista armeo. Kia diferenco!

EĈ ĜUTO MALGRANDA, KONSTANTE FRAPANTE...

Eldona entrepreno, eĉ plej modesta, bazigas ne sur fantazia grundo sed sur reala koto. Mono estas la sterko, kiu sekurigas fruktoričan arbeton. Nia sola financa bazo estas la helpo de la oferemaj legantoj de nia bulteno—la sola dependeco, kiun ni ŝatas—Se morgaŭ, por pluvivi, ni devus akcepti etiketon de iu difinita partia koloro, ni preferus malaperi. Se nia legantaro konscias pri niaj nuntempaj ekonomiaj malfacilaĵoj k se ĝi aljuĝas gravecon al la voĉo de POPOLA FRONTO, estas necese, ke per regula ofero de kelkaj moneroj oni certigu la regulan aperadon de la gazeto. Se tiu espero ne efektiviĝas, ni jam de nun sciigas, ke ni antaŭvidas la neceson laŭtigi nian voĉon unu solan fojon ĉiumonate anstataŭ du, ekde Januaro 1938.

Gekamaradoj! Samideanoj! Nia sorto estas en viaj manoj...



La prezidanto k la sekretario de la Grupo Laborista Esperantista de Valencio staras meze de vigla grupero da junaj esperantistoj novaj rekrutoj de freŝdata kontingento

AGRABLA VIZITO

SES ĈINAJ STUDENTOJ

En Ĉinio, same kiel en Hispanio, la junularo staras en la avangardo de la batalo. Kamparanoj, metiistoj, artistoj k intelektuloj anstataŭis siajn laborilojn per fusiloj k luktas k mortas kontraŭ la invadantoj, por ĉiu colo de tereno. Antaŭ la japana minaco, miloj da ĉinoj, loĝantoj disigite tra la surfaco de la terglobo, alkuras en la naskiĝlandon por defendi ĝin. Tiel, ekzemple, tiuj ses studentoj, kiuj pasigis kelkajn tagojn en Valencio.

Junaj, fortaj, optimismaj, jen iliaj por ni strangaj nomoj: Wan-Chih-Lung, Lu Tsung Hua, Djin Lin, Han Hsien Yang k Tchen Sjou Dian. Ili studis en diversaj urboj de Eŭropo. Ili estas teknikistoj pri Metalurgio, Meĥaniko k Elektrosocienco. Survoje al Ĉinio, tiuj studentoj kun ekzotikaj nomoj, volis koni propraokule la lukton en Hispanio; ili celis konatiĝi kun nia Popolarmeo k manpremi niajn heroojn. Ili deklaris: —Ni volas lerni el vi pri viaj spertoj, pri via organiza laboro. Ni volis koni, k adiaŭi antaŭ ol foriri, vian nevenkeblan Madridon.

Same kiel en Hispanio, ankaŭ en Ĉinio renkontis la invadanta faŝismo la ŝtalan muregon de tuta popolo, unuigita per la sama deziro pri libero k venko. «La popola antifaŝista unueco»—diras tiuj kamaradoj—«estas de tago al tago pli vigla en Ĉinio. Oni konscias tie, ke nur dank'al la streĉa unueco kontraŭ la japana imperialisismo ni povos elteni k forpeli la ofendantojn de nia lando».


La ses ĉinaj studentoj havas la saman skeptikan geston, kiam ili parolas pri la eŭropa Demokratio.


«—Kiel la hispana popolo, tiel la ĉina lernis je sia propra doloro, koni la okcidentajn demokratiojn. Niaj popoloj devas sin pretigi al la venko, sen—aŭ eĉ kontraŭ—la helpo aŭ la sinmortiga indiferenteco de la babilemaj demokratioj. Kio gravas, tio estas nia pravo k ke ni sukcesu konservi unuecan fronton. Tiel, Hispanio k Ĉinio venkos spite al ĉio, kun honto por la egoismo de tiuj potencoj, kies interesojn, ni defendas, malgraŭ ili, kun nia propra vivrajto k sendependeco».

SAGETOJ SEN MALICO

- Apenaŭ ni sciigis, ke la Konferenco de Bruselo estis kunvokata por prilakti la konflikton inter Japanio k Ĉinio ni antaŭvidis la solvon.
Jen! Oni jam starigis Komitateton...
Nia sperto rajtigas nin diri al la ĉinoj, ke ili forlasu ĉian esperon k konsili al ili, aranĝi mem la aferon kun la japanoj per rekta metodo, t. e. per batalado ĝis finvenko.
Tiu estos la plej efika procedo por persvadi la japanojn, ke la ĉinoj komprenis bone ilian celon, k ke ili volas kunlabori...
- Kiam la Itala konkero de Abisenio, kvindekda ŝtatoj kuraĝis pristudi eĉ la eblon decidi, kontraŭ la atencinta Nacio, embargo pri la petrolo.
Okaze de la invado al Hispanio, ĉu oni ne alvenos fine al la embargo de la petrolo kontraŭ Francio k Britio, fare de Mussolini?
La afero ja estus amuza... Cetere, «la du grandaj Demokratioj» sen diskute meritas tiun punon de la Diktatoro... pro sia hezitemo. Ŝajne, Italio tiam timis tiun decidon, ĝi kapablas decidi tion kontraŭ la aliaj... k la aliaj kapablas rezignaci servutece. Aliaj tempoj, aliaj moroj, aliaj mastroj. Kia dekadenco! Kia farso!
- En la haladza ne-intervena Komitato pri Ne-Interveno, la intervenistoj intervenantaj en Hispanion konsentis kun la ne-intervenantoj, kiuj ne intervenas, aliaj sin interveni, por kalkuli pri la intervenaj ne-hispanaj trupoj intervenantaj. Tiu «klara» interkonsento signifas:
1-e. Ke la intervenistoj intervenantaj sukcesos ree trompi la ne-intervenantajn ne-intervenantojn.
2-e. Ke la ne-intervenantoj, kiuj ne intervenas, denove lasos sin logi per la trompo de la intervenistoj, kiuj intervenas.
3-e. Ke ambaŭklasaj komitatanoj (intervenantaj intervenistoj k ne-intervenantaj ne-intervenantaj) kunlaboras fervore kontraŭ la intervenaton.
Jen ĉio, kion la hispanoj klare komprenas!
- Kion celas la pacemaj ŝtatoj? Evidente la pacon. Kiu kulpas pri la nuntagaj militoj en Oriento k en Okcidento? Sendube la ĉinoj k la hispanoj, kiuj obstine rezistas la invadon. Ja ili estas kulpaj pri daŭrigo de milito, per sia kontraŭstaro al la pacemaj klopodoj de siaj konkerantoj. Se tiel paroladas la atencantoj sen protesto de la «Demokratiaj» Potencoj k sen renkonti fortan baron de la laboristaro... k se ties senagado k silento celas eviti ĝeneralan militon ni proponas, ke la Nobel Premio por la Paco estu dividata tiel: unu triono por Mussolini k Hitler, alia por Demokratiaj Registaroj k Parlamentoj k la lasta por la «celkonscia» organizita proletaro tutmonda.
Kaj ĉiuj restos tiel kontentaj...
- En la registaraj rondo de Japanio—informas la gazetaro—oni pridiskutas nun la oportunecon, deklari militon kontraŭ Ĉinion.
Sed dume, la japanoj almilitis Ĉinion...
Selve la diskutado estas maloportuna, ĉar ĝi estas nenecesa. Tiel la potencoj, kunsidintaj en Bruselo, povas senzorge ignori, ke milito eksplodis en Oriento.

Tute same, kiel en Hispanio. Ĉu oni povus prave akuzi al Mussolini k al Hitler, ke ili deklaris militon al la hispanoj? Nel ili simple fargas defendan militon kontraŭ la hispana «bolŝevismo», kiu ruze penis enŝoviĝi en la Mediteraneon... La mondo gapas!





La vilaĝoj de Kastilio estas brunaj kun la kampoj tre ampleksaj k' ebenaj. La premo de la despotaj terposedantoj forprenis la ĝojon de la simpla vilaĝanaro. Nuntempe, la milito kontraŭ la invadintoj ankaŭ estas milito kontraŭ la propraj vilaĝaj tiranoj k' se, pro tio, la filoj batalas en fronto, la patroj kulturas la kampojn kun la intima konvinko ke ili, nur nun, fosas k' semas sekunde sian propran sulkon.

AGITADO INTER LA MALAMIKO

Niaj militaj komisaraj bone komprenis la gravecon de agitado inter la malamikaj vicoj. La propagando en la faŝista kampo kreskadis tiom konsiderinde, ke nuntempe ĝi fariĝis unu el la decidaj armiloj por la atingo de la popola venko.

Jam en la unuaj tagoj de la atako al Madrido, oni organizadis babiladojn por la soldatoj de Franko. Tio okazis pere de potenca laŭtigilo, kiu atingadis 3 aŭ 4 kilometrojn. Ĝi trakuris ĉiujn sektorojn de Madrido. La elsendojn oni faris ĉiam dum la nokto. Se la germana Stabo komandis atakon tra *El Pardo*, tien alkuradis tuj la «Laŭtigilo de la Fronto» por alparoli la malamikajn soldatojn, batalante la faŝismon, ne nur per armiloj, sed per la vero kun la pravo k' la rajto de nia memdefendo. Alifoje la lukto estis ĉe rivero Jarama, aŭ en Gvadalaĵaro; tie ankaŭ prezentigadis nia malnova k' glora laŭtigilo. De fronto al fronto, senripoze, ĝi trakuras ĉiujn sektorojn de la Centro. En ĉiuj tranĉeoj oni aŭskultis ĝian voĉon k' centoj da transkurintoj alvenis allogitaj per ĝiaj vortoj. En iu fronto ĝi ricevadis la jukadon de la kuglo k' en alia la gratadon de la obusoj de murtero, sed, neniam ĝi silentis. Tio okazadis antaŭ kvin monatoj ankoraŭ, kiam mi alvenis al Madrido. Nuntempe, nur por la centraj sektoroj, ekzistas pli ol 40 laŭtigiloj, kiuj dumnokte direktas siajn buŝegojn al la «alia mondo», tiu, kiu staras kontraŭ niaj linioj. Kiam la babiladoj

finiĝas, tiam komencas populara muziko, kiu eniĝante iliajn korojn, memorigas al la faŝistaj soldatoj ilian popolan devenon.

Aliajn agitmanierojn oni realigas ankaŭ per flugfolioj. Dum unu jaro, Madrido elĵetadis sur la faŝistajn tranĉeojn ĉirkaŭ tridek milionojn da flugfolioj. Per raketoj, per kanonpafoj, per aviadiloj oni elĵetadas nubojn da flugfolioj. Por germanaj k' italaj soldatoj estas presitaj en ilia gepatra lingvo. Oni ne malatentas unu detalon. Argumento estas kvazaŭa kuglo!

Lastatempe oni elpensis novan tre originalan rimedon por la propagando, kiu havis grandan efikon. En la faŝista kampo treege malabundas la cigareda papero. Do, ni mem havigas al la soldatoj de la kontraŭaj tranĉeoj tian paperon. Sur ĉiu kvina folio, estas presita alvoko de la ĉi tieaj fratoj. Multfoje, kiam alvenas forkurintoj, ili kunportas ankoraŭ duonuzitaj niajn elĵetitajn libretojn.

La armilo de la propagando estas nevenkebla, kiam ĝi defendas tiun noblan aferon, kiel la sendependecon de la hispana popolo. Ĉiam kiam ni atakas per ĝi, la malamiko volas silentigi tion per pafoj; sed, ĉiam la laŭtigilo daŭrigas parolante k' elĵetante, per siaj buŝegoj, la veron pri nia justa memdefendo.

De tago al tago pligrandiĝas la nombro de niaj laŭtigiloj, k' ili estos unu el la decidaj armiloj, kiam cirkulos la komando de nia finvenka ofensivo.

Rikardo KILES

Madrido, 2 - 11 - 1937.

PROBLEMOJ DE NIA TENDO

ESPERANTO NE POVAS ESTI NEŬTRALA INTER LIBERO KAJ TIRANIO

La vento blovas el Danio kun fluoj pruvantaj, ke eĉ multaj neŭtralaj esperantistoj ne povas eleni sian neŭtralecon ĝis la punkto, ke ĝi estu tia, rilate la veton inter faŝismo k' demokratio. La interesa gazeto «La Semajno», de Bjerringbro (Danio), raportas ke rezulte de sinteno de la prezidanto en la tiea Esperanto-Asocio, la registaro rifuzis permeson pri restado al germana profesoro de Esperanto, devigata eksterlandiĝi pro opinidiferenco kun siajanda diktatoro. Tio estigis grandan ekscitiĝon inter la neŭtralaj esperantistoj de Danio; tiel pro la agado de ilia prezidanto, kiel pro solidaro kun ilia persekutata samideano.


Ankaŭ la sama gazeto plendas pro la malakcepto trakti rezolucion de multaj germanaj esperantistoj—el Germanio mem—prezentita al la universala Kongreso en Varsovio. La germana rezolucio esitis porpaca k' celanta la efektivigon de la ideo por kiu Esperanto kreiĝis. La straro de unu el la neŭtralaj internaciaj asocioj rifuzis prilakti la rezolucion de la germanoj, pro ĝia politika tendenco por paco.

Ni volas atentigi la neŭtralan esperantistaron pri la historio de nia lingvo. En unu el la unuaj kongresoj internaciaj, kelkaj partoprenintoj intencis devigi la movadon ludi rolon de helpa mondlingvo, nenio pli! tio estas, ke la movado forlasu sian «internan ideo» pri paco k' fratigo de la homaro; pri toleremo inter ĉiuj ideoj k' kontraŭstaro al la ajn despotismo. La nomitaj proponintoj diris, ke multaj personoj povus simpatii kun la mondlingva ideo, sed ne kun la specialaj senioj karakterizantaj la movadon, k' tio estus domaga al Esperanto kiel nura ilo por interkomprenigo. D-ro Zamenhof starigis sur la estrado por respondi tiajn sugestojn k' metante en sian paroladon la plej delikatan fervoron de sia granda koro, li diris fiere, ke tiu deziro ne povas esti akceptata ĉar Esperanto devas esti idealo pli alta ol internacia kodo por komercaj k' turismaj rilatoj. Lia fluzio estis la humaneco de lia verko! Tondra aplaŭdigo montris la aprobon de la ĉeestintaro.

Kaj nun starigas unu grava demando. Sciante la superan idealon, kiu lulis la unuajn balbutojn de nia lingvo, ĉu la esperantistaro rajtas resti neŭtrala, i. e. indifera antaŭ la nuna gravega problemoj pri demokratio aŭ faŝismo? Ĉu la Esperanto-Asocioj ne ĉiam akceptis la opinion de la plimulto anstataŭ tiun de iu privilegiita trudanta la malplimultan ordonon? Zamenhof ĉiam estis kun la demokratioj meidoj. Okaze de traktado, pri la eventualaj estontaj ŝanĝoj en la lingvo, oni demandadis al li, kiun metodon oni prenis por akcepti ilin, k' li ĉiam same respondis: Oni devas akcepti la opinion de la plimulto! Neniam li intencis starigi kiel sola individuo kun la rajto ellabori la lingvon, malgraŭ tio ke li estis ĝia kreinto. Li nur donadis konsilojn, sed neniam li ilin trudis.

Nu, la koncepto pri la neŭtraleco de Esperanto povas nur rilati la diversajn politikajn metodojn, direktataj al la plibonigo de la ekonomiaj kondiĉoj de la Homaro. La neŭtraleco devas konsisti je la nealiĝo al iu ajn el la diversaj skoloj. Sed indifereco antaŭ despotismo k' teroro, neniam! ĉar tiuokaze la neŭtraleco ne estas neŭtraleco sed favoro al la despotismo k' komplezo al la teroro.

Esperanto havas gravan rolon, kiun ĝi devas plenumi kun fiero k' digno; Esperanto estas alta grado, pro ĝia facileco, en la popola kulturo; restu ĝi sur sia posteno, helpante laŭ sia forto al la savo de la Homaro. La nobla ideo de Esperanto ne trivialis restante indifera antaŭ la homecaj problemoj. Ĝi batalu por la demokratio, k' savante ĝin, Esperanto savos sin mem! Inter libero k' despotismo la neŭtraleco ne estas neŭtraleco!



Abomena Nacisocialista Triunuo

Madrido

S. Karp

Ho, Madrid', Madrid', Madrid'!
Vin memoras tuta mondo,
Urbo de l'popola fronto,
Urbo de proleta spit'!

Kiel nova sun' vi ardas
Super la kruela ter'
Kaj sur viaj bul (e) vardoj
Demonstradas la liber'

Jen levigas barikadoj,
Bomb' eksplodas—tondra krak',
Kaj al viaj sangaj stratoj
Venas Franko en atak'!

Ho, Madrid', Madrid', Madrid',
Urbo de l'popola fronto—
Vin observas tuta mondo
Kun respekto k' ekscit'.

Ne plu sonas la muzikoj,
Ĉesis kanto, serenad',
Morton ĵetas malamikoj
En terura kanonad'

Bastion' de l'ruĝa fronto,
Venkos vi en la milit'
Vin memoras tuta mondo,
Ho, Madrid', Madrid', Madrid'.

(El *Sennacieca Revuo*)

Ĉu Hispanio povos rezisti?

Julius Deutsch, aktiva kunlaboranto en la defendo de Hispanio, je la servo de la Respubliko, pro malano estas devigata interrompi siajn militajn postenojn, por kelkaj semajnoj. Post insistita peto li verkis, por *Informations Internationales* grava periodaĵo eldonita de la Sekretariato de la Laborista Socialista Internacio, jenan interesan studon pri la nuntempa situacio de nia lando.

Apenaŭ ĵus trapasinta la landlimon, mi estis superŝutata de timoplenaj demandoj de multaj amikoj, kiuj avidis scii ĉu la hispana Respubliko estas en kondiĉoj por rezisti la atakegojn de la fripona faŝista koalicio. Mi ekprovas respondi ĉi tie la demandojn, kieleble plej bone, en la kadro de mallonga resumo:

Dum la jaro, kiun mi pasigis en Hispanio, la financaj, ekonomiaj k' militaj problemoj de la Respubliko tre multe plibonigis. Antaŭ unu jaro, la milita situacio de la respublikanoj ŝajnis senespera k' preskaŭ sen solvo. Al la perfekta milita aparato de Franko, kontraŭstaris nur la popolaj milicoj rapide pretigitaj k' tre fuŝe armitaj. Oni ne povis eviti tiel la antaŭeniron de la faŝistoj ĝis Madrido. Sed, ĝuste en tiu momento, ekkomencis la metoda rezistado. Kreiĝis armeo tre bone disciplinita, post granda penado—mi ne neos tion—sed la celo efektiviĝis! Hodiaŭ, en la frontoj, deĵo-

ras potenca respublikana soldataro, kiu elpruvigis sian efikon. Gvadalaĵaro, Brunete k' Belchite estas elokventaj atestoj pri tiu aserto.

Oni devas trafte konstati, ke jam ekde kelkaj monatoj, la faŝistoj evitas la riskojn de la ofensivo sur la centraj scenejoj. Post sinsekvaj fiaskoj antaŭ Madrido, ili kontentigis nur per abruptaj atakoj al la avangardaj pozicioj, sen sukcesa rikolto. En la sudo falis Malago, malproksima, je pluraj centoj da kilometroj, de la milita akso de la Respubliko; en la nordo, la faŝismo detruaĉis Baskion, por kiu ne eblis helpo pro ĝia absoluta izoleco kun la cetera lojala zono. Kontraŭ la baskoj, preskaŭ sen defendomaterialo, oni ĵetis kompletajn italajn diviziojn, armitajn ĝis la dentoj, kun la abomena germana tekniko pri moderna milito. Malgraŭ ĉio, la baskoj rezistis pli ol tri monatojn. Sub strategia vidpunkto, ne estas eksterordinare, ke Bilbao, Santander k'

Gijon finfine falis, sed nur ja mirinde estas, ke Italio k' Germanio bezonis tiom da tempo por atingi tion.

Tamen, tiuj relativaj sukcesoj de la invadintoj, sur duagradaj kampoj, tute ne signifas ian decidan rezultaton. La solvo nur povas aperi tra la batalkampoj de la centro. Kompreneble, oni devas supozi, ke la trupoj de Hitler k' Mussolini, sen celoj jam en la nordo, estos ĵetataj internen de Hispanio, k' pro tio, kiel natura sekvo, bruegos novaj grandaj bataloj. Se en tiuj bataloj restus solaj la soldatoj de Franko, pri la certa rezultato ne meritus la penon dubi eĉ unu minuto. Tiam, post malmultaj monatoj, Hispanio restus libera je la faŝista pesto. Tion oni bone scias, ne nur en Seviljo sed ankaŭ, eble pli frunde, en Romo k' Berlino. Tial, evidente, Hitler k' Mussolini tute ne retiros siajn «volontulojn» se almenaŭ la okcidentaj demokratiaj potencoj ne konsideras serioze la aferon...

Ĉu intertempe Hispanio povos atendi? La respondo al tiu demando, dependas de onia opinio pri la ĝenerala situacio. Hispanio transformiĝis en la centra punkto de internacia politiko. Iberio mem estas ĝuste la loko, kie interpuŝiĝas la interesoj de la grandaj potencoj. Tial eĉ povas okazi, ke la prok-

sima tutmonda milito komencos en Hispanio. Tie, oni jam ne plu luktas por Hispanio; oni jam luktas por Eŭropo!

Nunmomente, la grandaj demokratiaj potencoj cedas k' cedas, paŝon post paŝo, antaŭ la faŝistaj ŝtatoj. Sed, por kioma tempo, tio ankoraŭ estos ebla? La esenco mem de la faŝismo estas la militemo. Ĝi ne povas forlasi la entreprenitan aventuron sen risko de sia propra ekzisto. Certe taŭgas por nenio, al la demokratiaj nacioj, la danĝera ludo ignori neprajn kompromisojn. La fino ne povas esti alia ol nova granda milito se, pro impona koalicio de fortaj potencoj, la faŝistaj landoj ne estas devigataj cedi.

La hispanaj popolanoj devas rezisti ĝis kiam la ekstera opinio revenos al ilia favoro. Ili devas batali ĝis kiam la aliaj demokratiaj nacioj de Eŭropo ekkomprenos la komunecon de siaj interesoj kun tiuj de la Hispana Respubliko, agante konsekvence. La Respubliko iome similas al sieĝata citadelo; ĝi atendas helpon el ekstero, kiu malfruas. Ĉu kapablos ĝi rezisti ĝis alveno de la apogo? Laŭ mia opinio, jes! Ĝia milita situacio larĝe pravigas mian optimismon. Malgraŭ ĉiuj histeriaj venkaj krioj, kiujn pafas la faŝistoj, iliaj armeoj ne sukcesis fari eĉ plej etan progreson

sur la centraj kampoj; male, en diversaj lokoj, ili estis atentinde forpuŝataj. Ankaŭ estas vero, ke en tiaj aferoj ne nur influas decidis la armiloj; oni devas serioze konsideri la financon k' la ekonomion. Mi ne kuraĝas tuŝi tiun ĉi temon ĉar, tro okupita en militaj aferoj, mi ne havis tempon nek ŝancon studi amplekse la ekonomiajn problemojn, kvankam sufiĉe longa restado en la lando permesis al mi vidi multajn detalojn, kiuj povas glate kontribui trovi ĝustan juĝon pri la ĝenerala situacio. Estas ja vere mirinda—mirindegal—la fervoro per kiu la hispana popolo laboras. Nun, la agrikulturo, kiel la industrio, estas en vigla aktiveco. Oni devas speciale rimarki, ke apenaŭ ekzistas ia socia diferenco. Tio ĉi estas tre valora atingaĵo por ties nacia ekonomio, dum tiel terura milito.

Restas ankoraŭ problemetoj pri la interna politiko. Neniu ne scias, ke ĝi estas tikla k' eĉ pli jukanta akno ol povas pravigi la socia strukturo de la lando. En la nuna situacio, gvidadi la internajn politikajn fluojn estas laboro aŭ tasko, kiu apartenas, antaŭ ĉio, al la proletaj organizoj. De ilia politika matureco, zorge k' konscie aplikata al la bezonoj de la milito, dependas ne nur la sorto de Hispanio sed ankaŭ la sorto de la tuta Eŭropo.

LOJALECO ĜIS LA MORTO

(VERA EPIZODO)

Voĉo de observanto, deĵoranta en avangarda posteno de tiu fronto, fendas la silenton de la fajrolinio.

—Atentul Alvenas iu forkuranto el la sudo...

La komandanto fajfas, laŭ speciala maniero, kiel averto por ke oni ne pafu. Tamen, fusiloj k mitraliloj viglas. Ne por pafi kontraŭ la alvenanto—nia frato, kiu alproksimiĝas—sed por defendi lin, se necese, je ebla persekutado.

Daŭra pafado el la faŝistaj tranĉeoj pravas, ke ili malkovris lin. La forkuranto ŝetas sin teren; li restas momenton senmove. Subite, li faras grandegan salton. Unu el niaj pafmaŝinoj funkcias, ĉe la dekstra flanko, por misorienti la malamikon. La forkuranto flugas, elstarante enmeze de la ribela plumbos. Ni timas, ke iu kuglo trafis lin... Je dek metroj de niaj tranĉeoj li krias «Vivu la Respubliko!» k la ĉifonulo falas finfine en la lojalan pozicion.

Ĉiuj ĉirkaŭas la ĵusalveninton. Li estas alta, forta, bruna kiel bronzo. Lia hararo splitiĝis sur lia vizaĝo. Liaj piedoj sangumas tra la restaĵoj de la tolsuoj. Li trinkas avide glason da vino... Neniu parolas. Li liveris siajn plenplenajn kartoĉojn, sian novan pafilon... Li provas paroli, sed lia voĉo krevas en torento da plorsingultoj. —Murdistoj, kanajloj!—li krias, levigante sur la parapeton. Kaj li finas, falante en angoro, sur la fundon de la tranĉeo, plorante kiel knabo, kvazaŭ freneza.

—Lasu lin trankviliĝi... Lia angoro nur per plorado kvietigis; diras la kaporalo al la soldatoj. La forkurinto, post eksplodo de lia emocio, sternita pro laciĝo, dormas kiel trunko... Poste, li rakontis siajn travivaĵojn. Rekrutita perforte, li estis enkondukata al la tranĉeoj kun dek aliaj vilaĝanoj de Carballino (Galegio). Iun tagon, en la frua mateno, liaj dek amikoj foriris fari servon, kiun oni ordonis al ili. Ili kunportis fusilojn, bombojn k abundajn kartoĉojn.

—Per siaj okuloj, ili sciigis min pri sia intenco. Ni ĉiuj estis konsentintaj forkuri en la unua okazo... Post kvar horoj, iu kaporalo diris al mi: —Tiu dek galegoj estas tuj fusilmortigitaj tie, sur tiu monteto. —Kion do ili faris?—mi demandis, penante ne malkovri mian angoron.

—Kion multaj faras k vi mem eble faros morgaŭ—li respondis—. Ili interkonsentis transiri al la «ruĝuloj» k ili kuris tien, kie, laŭ ili supozis, estis la ruĝaj parapetoj... Sed ili eraris k ili falis kaptitaj de patrolo de la Legio. Mi ne volis aŭdi plu—daŭrigas la soldato—mi kuris al la montdeklivo. Tie ili estis, senarmaj, fleksitaj al la tero, fosante per pioĉo k ŝovelilo. Jen kio okazis, laŭ raporto de serĝento. Apenaŭ ili estis kaptitaj k oni malkovris ilian intencion, ili estis admonataj de la leŭtenanto, kiu laŭŝajne estis konvinkita per iliaj vortoj:

—Ni tute ne celis forkuri; sed ni misorientiĝis k

kredinte, ke ni falis en la respublikanajn tranĉeojn, ni vivuis la Respublikon k levis la pugnojn, por eviti, ke ili mortigu nin...

—Nu bone, knaboj. Vi agis lerte... Necesas esti ruza—respondis la legia leŭtenanto—. Nun, okupu la avangardan parapeton k ekpafu al la «ruĝaj» tranĉeoj... Mi volas vidi, kiel vi scias uzi la fusilon. La dek malfeliĉaj soldatoj rigardis sin, unu la alian, kun pala vizaĝo. Estis hezito dum sekundo. Fine, unu el ili ekpaŝis k alparolis la leŭtenanton. —Ni... vi komprenu, ni ja estas laboristoj... ni ne sentas la faŝismon... k ni faris promeson, neniam pafi kontraŭ niaj klasfratoj...—diris trankvile, levante siajn grizajn pupilojn al la leŭtenanto.

—Bone. Se vi do, rifuzas pafi, fosu tranĉeon tie, apud la montdeklivo—blekis kolere la oficiro. En tiu momento alvenis mi, kun aliaj legianoj. Mi vidis la malfeliĉulojn, klinantaj super la sulko. Unu el la kompatinduloj diris al la oficiro: —Kun duono da metro, la kavo jam estos sufiĉe profunda por enterigi nin.

—Kiu pensas pri tio? Temas konstrui parapeton...—diris ridante la leŭtenanto, kun demona gesto, kiu glaciigis la sangon de ĉiuj ĉeestantoj. Unu el la fosantoj malvigligis, oni vidis, ke liaj kruroj fleksiĝas, k lia mieno iĝas pala. Iu kunulo subtenis lin k diris: —Ne perdu la fortojn, estu virol Oni mortas nur unu fojon—. Daŭrigis tiam la laboro, ili enŝovis pli streĉe la pioĉon. Fine, la funebra tasko estis farita. Mi ne fargesos la teruran momenton. La leŭtenanto mem vicigis ilin apud la tranĉeo, kiu estis fakte tombo. Je unu signalo lia, iu germana serĝento, nomita Vilhelmo, per aŭtomata fusilo, mitralis ilin senkompatate. Ili falis, farante strangajn saltojn, mortante kun la kapoj k dorsoj ŝprucigante sangon... Necesas finmortigi ilin. La leŭtenanto pafis sian longan pistolon sur la malfeliĉulojn. Poste, kelkaj teramasoj per ŝovelilo. Mankis ankoraŭ ĵeti teron al du. La serĝento Vilhelmo malantaŭeniris du paŝojn. Unu el la viktimoj ĵus ekstaris, kun mortinta vizaĝo. —Vi ne tuŝis min, murdistoj... Sed mortigu min, ne enterigu min vivanta...—petegis li. Tiam la monstro, per bato de ŝovelilo, fortega bato, falĉis la kapon el la korpo. Oni finenterigis ilin... Mi ne povis manĝi... Mi ne kapablis dormi. Mi tuj decidis forkuri, apenaŭ mia deĵoro komencus. Mi ne kunportis bajoneton, ĉar mi lasis ĝin en la korpo de la germana serĝento, kiam li venis al mi por preni la novaĵon... Tiu diablo ne buĉos pli da galegoj...

* * *

Ĉiuj aŭskultis mute en la respublikana tranĉeo. La forkurinto, kun streĉitaj manoj en la kapo, singultis kiel infano. La angoro de la forkurinto frenezigas la gardistojn de la tranĉeo, kiuj eksaltas al la parapetoj. En la nokta malhelo, la fusiloj zumas k la mitraliloj tondras, tondras, dum aŭdiĝas kriaj voĉoj de komando k fajfsonojoj en la faŝistaj linioj montrantaj malkvietigon k timon pri atako... En la fundo de la lojala tranĉeo, la forkurinto ree dormas kvazaŭ trunko.

Dum la Reakcio atakas, la Demokratio dronas en torento da vortoj

«Se ni volas defendi la Demokration, antaŭ ĉiuj kritikoj, kontraŭ la forta konkurenco de aliaj ĵaluzaj sistemoj, necesas esti pretaj fari por ĝi la samajn oferojn ol faras la adeptoj de diversaj politikaj doktrinoj. Tio estos fragmento tre grava el la prezo, kiun ni devas pagi por asekuri la pacojn.» (Vortoj de Eden en Llandudne, 15. Oktobro 1937.)

«La fakto, ke Mussolini kuraĝas agnoski publike la Italian invadon en Hispanio, estas pruvo pri la hoaso tra kiu baraktas la mondo, pro la provokemo de la diktatoroj k la malkuraĝo de la demokratioj.» (Vortoj de Grumbach, en la franca Parlamento, 27. Oktobro 1937.)

MOZAIKO

● La 21. Oktobro oni ekzekutis 20 virinojn en San Sebastian; franca faŝista gazeto diras, ke la sola krimo de tiuj virinoj estas, ke ili fuĝis al Francio kiam la faŝistoj okupis Bilbao. Nun ili revenis, fidante al faŝistaj promesoj pri plena respekto de la vivo al ĉiuj fuĝintoj k kaptitoj. En Francio ĉiuj rifuĝintoj estis petataj pri elekto de zono por reveno; ili preferis returni tra Irún k... atingis fusilmortigon.

● La itala gazetaro, intencante iel rajtigi la plenan k malkaŝan intervenon de Italio en nia lando, kulpas la aliajn pri tio; kion ili mem faras. La itala gazeto *Stampa* asertis ke ili ne sendis aeroplanojn al Franko, k malgraŭ tio, Francio sendis al nia registaro 1214 aeroplanojn por la milito. Estas vera damaĝo ke tio nur estas romano k ne historio; alia estus nia situacio...

● La 30. Oktobro, radiostacio *Radio Bilbao* anoncis la malkovron de konspiro en Bilbao kontraŭ la faŝistoj. Tuj la provincestro ordonis, kun minaco de mortpuno, ke ĉiuj enloĝantoj liveru antaŭ ol la fino de postmorgaŭa tago ĉiujn armilojn al la aŭtoritatoj. Ni demandas: ĉu la «liberataj» enloĝantoj ne estas kontentaj sub faŝista reĝimo? Tiam sintenon oni nomas «maldankemo»!

● Niaj trupoj, en sektoro de Norda Aragono, observis la alvenon de novaj faŝistaj trupoj. Nun temas pri negroj kiuj estas komandataj de italaj oficiroj. Eble ili devenas el Abisenio. Certe Italio eltiris jam fruktodonajn rezultojn el la nova Imperio. Tiuj trupoj plifortigas la «naciŝtan» nuancon de la armeo de Franko.

● La 1. Novembro, frumatene, la angla ŝiparo spertis novan perdon.

La ŝipo «Jean Weems» estas dronigita, malgraŭ tio ke ĝi kunportis du observistojn de la Londona Komitato. Unu el ili estas la svedo Gustav V. Chasom kiu portis la kontrolan membrokarton n.º 520, k la alia estas la litovo Arnold Kiff kun membrokarton n.º 501. La ŝipo, kiu transportis tritikon k lakton, pereis k la angla ŝiparo hazarde sin savis.

Jen kiamaniere, malgraŭ la konferenco de Nyon, la faŝistoj malfortigas iom post iom la anglan potencon.

● La kuraĝa faŝista aviadilaro daŭre atakas «militajn» celojn. La 2. Novembro, je la kvara posttagmeze, naŭ trimotoraj aeroplanoj bombardis la malferman urbon Lerida. La viktimoj estas 225 mortintoj (inter ili 50 infanoj kiuj ĉeestis lernejon) k 700 vunditoj. La aviadistoj unue ĵetis la bombojn k poste mitralis la stratojn.

Per tiu metodo, tre baldaŭ ni akiros la faŝistan kulturon.

● Al nia fronto de Ekstremaduro alvenis, 3. Novembro, 22 laboristoj, luktintaj en andaluzia montaro, de la unuaj tagoj de la ribelo k kiuj nun trafis niajn tranĉeojn. Ili estas kamparanoj de Seviljo, ministoj de Riotinto k laboristoj el diversaj zonoj. Ili kunportas fusilojn, bombojn k municion, kion ili kaptis al faŝistoj dum pli ol unu jaro. Ili efike malhelpis la iradon de faŝistoj tra la montaro.

● Ses cent hispanoj, kiuj ne povis toleri la faŝistan kunvivadon en Algeciras, fuĝis alveninte en Gibraltaro lastan semajnon utiligante diversajn rimedojn. Ili estis helpataj de kelkaj soldatoj. Pro tiu fakto, la faŝistoj denove arestis amase.

● La 6. de Novembro eliris el Como (Italio) nova divizio de «nigraĉemi»

VIZITO DE KORVO

Vittorio Mussolini rikane fanfaronis pri senpuna bombardado kontraŭ la mizerajn vilaĝojn de Abisenio. Nun, alia filo de la monstro, Bruno, ĵus flugis super Valencio k bombardis la urbon. Multaj modestaj laboristaj domoj restis detruitaj pro la «heroj». La korvo, ido de lupo, ekveturis al Hispanio la 16. de Septembro, el itala aviadeto Ciampino, sub la komando de Kolonelo Fisco, kiu instruis lin bombardi trafte, anstataŭ sovaĝajn afrikajn kabanajn, eŭropajn civilizitajn urbojn, eble kun permeso de la ĉifona Londona Komitato...

zuloj» konsistanta el naŭ batalionoj. Unu el ili estas la 24.^a Bataliono de biciklistoj, kiuj dum pluraj semajnoj ekzercis en la ĉirkaŭaĵoj de Como.

Kiel oni vidas, Mussolini knedas senĉese «volontulojn».

● Kelkaj ekleziuloj, malatentante la predikojn de Kristo, propagandas daŭre k favore al faŝistoj. En urbo Riga dum diservo en preĝejo *Salvacion* la pastro Fetter suprenlevis la Biblion k diris: «Nun ni parolu pri Franko». Unu el la ĉeestantoj nomata Eglitis, laŭte demandis tuj: «Kiun ni devas kredi, ĉu Frankon aŭ la Biblion?» Li estis forpelita el la preĝejo k kondamnita al monpuno.

● El Svisio oni sciigas, ke ĵus alvenis en havenon Genova 300 kvalifikitaj militistoj el Germanio. Ili vojaĝos tuj al insulo Maljorko k poste al urbo Seviljo.

Malgraŭ tiu senĉesa alveno de «volontuloj» la Londona Komitato ankaŭ anoncas la sendon de «volontula» delegitaro al nia lando por efektivi la ne-intervenon.

● Mussolini denove parolis pri la afero de la italaj «volontuloj» k asertis, ke ili ne forlasos Hispanion ĝis kiam la milito estos finita. La faŝista diktatoro povas ĉion deklari k ĉion entrepreni; la membroj de Komitato pri ne-interveno estas tre «volontaj» surdaj k blindaj.

● La gazetaro «naciŝta» de Bilbao anoncis, la 30. Oktobro, ke 9.000 maŭroj estas alvenintaj en faŝistan zonon k ke aliaj 23.000 maŭroj nun faras militajn ekzercojn en kampoj de Tetuano k Arcila (Maroko).

Laŭ ĵurnalo *Diario de Cadiz* nun estas 160.000 maŭraj soldatoj en la «naciŝta» armeo por savi civilicon...

Greta Garbo, la fama «stelo» de la kino, ne estas la frivola pupo sed delikata progresema virino; ŝi, kun aliaj gravaj kinaj geaktoroj, staras senhezite apud la hispana popolo. Nur antaŭ kelkaj semajnoj, dum privata konversacio kun hispana popolfrota ĵurnalisto, ŝi diris plenemocie: «Se mi rajtus fari deklarojn en la gazetaro; mi asertus, ke en via terura milito nur devas venki la popolo; nek mono nek armiloj sukcesos velkigi la fervoron de la respublikanoj. Tamen, kvankam la reguloj de miaj kontraktoj malpermesas al mi publike opiniadi, mi konfesas al vi, hispano, ke mi legas viajn gazetojn k eĉ morale mi suferas viajn dolorojn. Antaŭ kelkaj tagoj, mi estis vidante, en kinejo, informan filmon pri bataloj en Hispanio. Mi ne povis eviti larmojn pro tiom da senkulpaj infanoj detruitaj de la mitralo, kiun ĵetas kruele, de la aero, tre malkuraĝaj k tre perfidaj homoj.»



ALDONA SAGETO

En la diplomataj medioj, oni multe klaŝas pri retiriĝo de la «volontuloj». Oni akuzas pri ekzisto de almenaŭ 110.000 italaj soldatoj, batalantaj en Hispanio. Mussolini k liaj reprezentantoj asertas modeste, ke oni troigas la nombron. Regas konfuzo, suspekto, prokrasto, stagno.

Vane oni babilas pri la nombro da faŝistaj volontuloj k ni volas helpi al disrompo de tiu «kontraŭfaŝista manovro». Ĉar la italoj ne estas volontuloj, sed regulaj trupoj ordone senditaj de sia registaro, sufiĉe jam pri la «italaj volontuloj». La Londona Komitato do, ne semu konfuzon en aferon, kiu malgraŭ sia komplika aspekto estas tre simpla. Se la temo estas nur pri volontuloj, ni atendas forigon de la internaciaj brigadanoj, la solaj volontuloj en Hispanio! Ĉio alia estas perturbi la pacon, ĉu ne?

NIA MUNICIO

Valencia esperantistaro . . .	83'25	ptoj.
J. M. B. — Cedrillas . . .	15	»
P. C. — Cartagena . . .	12	»
M. L. — Cocentaina . . .	3	»
V. R. — Barcelona . . .	5'25	»
J. O. — Sarriena . . .	15	»
S. P. — Fronto Teruel . . .	5	»
J. R. — Bollatía . . .	10	»
J. T. — Torrevieja . . .	5	»
J. V. — Cartagena . . .	10	»
M. L. — Los Jerónimos . . .	20	»
M. W. — Angleur . . .	20	b. fr.
G. S. — La Hulpe . . .	20	»
H. — Wandre . . .	20	»
G. C. — Antwerpen . . .	5	»
L. D. — Antwerpen . . .	15	»
A. L. — Huy . . .	10	»
J. K. — Zaandam . . .	0'50	gd.
A. B. — Amsterdam . . .	0'17	»
H. H. — Zaandam . . .	1	»
F. v. E. — Sonburg . . .	1	»
M. H. v. d. V. — Knollendam . . .	0'50	»
A. R. L. — Amsterdam . . .	1	»
F. v. d. M. — Utrecht . . .	2	»
FLE Sekcio 15. — Rotterdam . . .	1	»
G. J. W. — Den Haag . . .	2	»
J. J. — Heerlen . . .	1'50	»
J. Th. L. — Haarlem . . .	0'50	»
D. L. — Haarlem . . .	2'55	»
C. — Ymuiden . . .	3'15	»
V. D. L. — Haarlem . . .	3'70	»
G. B. A. — Luton . . .	1	ŝil.

J. W. F. — Hull . . .	2 6	ŝil.
B. M. — Cowdenbeath . . .	1	»
E. L. O. — London . . .	2/6	»
N. L. — Moonah . . .	4/2	»
S. R. M. — Biggin Hill . . .	2 6	»
J. L. — Helsinki . . .	80	fr.
H. B. — Pardaillan . . .	10	»
E. W. — Annemasse . . .	20	»
E. V. — Brno . . .	50	»
Gr. Esp. Ouvrier. — Orleans . . .	22	»
B. R. — Nîmes . . .	10	»
R. V. — Houilles . . .	20	»
D. — Asnières . . .	10	»
P. R. — Villeneuve le Roi . . .	10	»
E. B. — Paris . . .	10	»
Ch. L. — Meudon . . .	20	»
M. G. — Besançon . . .	50	»
B. B. — Macon . . .	10	»
A. J. — Mont Gavet . . .	20	»
P. C. — Oyonnax . . .	6'50	»
M. A. — Saint Petersburg . . .	28	»

NEKROLOGO

K-do Jim Coomes, angia volontulo el Ealing, forta, sana junulo mortis en Belchite en la atako kontraŭ la faŝistoj. Li ricevis ordonon starigi paflegon tute apud faŝistaj ŝirmejoj. Kvankam li konstatis la dangeron de tiu pozicio li okupis la postenon ĝis perfida kuglo trafis lin. Karan saluton al lia memoro!

POPOLFRONTA LETERUJO

K. B. — Parizo. — Ni plenumas vian peton en la koncerna fako. Dankon pro viaj senĉesaj klopodoj. Ni scias, ke ĉie k ĉiam vi estas frata kamarado k kunbatalanto. Elkoran bondeziron!

J. B. T. «Nova Sento». — Barcelono. — Ni bone notis, kun danko, la enhavon de via poŝkartiko k reciprokas amikan senton.

V. R. G. Parizo. — La «super-raculoj» estas fakte zelotoj, ŝvebantaj super la bono k la malbono. Ili nepre estos forbalaitaj per la forto de la faktoj, kune kun la balasto de siaj elcerbaĵoj. Ni korespondos al viaj fratcaj esprimoj. Vi ricevos la mankantan numeron.

E. L. (B. L. E. A.) Stepnez, Londono. — Ricevinte salutleteron, ni penas atingi respondon. Danke ni agnoskas vian laboron. K-do V. B. k ni ĉiuj kore vin salutas!

P. Z. H. — Svendborg. — Se nia enketo sukcesas, ni informos vin pri la k-do, kiun vi pridemandas. Kun danko k esitimo ni notis la ceteran parton de via letero, speciale tion, kio koncernas niajn ĝeinfanojn en Danio.

J. B. — Londono. — Via lasta letero, kiel ĉiuj el vi, ĝojigis nin. Ĝi konsistigas belan pruvon pri via amikeco k taŭgas por nova konstato pri via fervoro. Ni jam forsendis la petitajn akzemplerajn, krom tiu de num. 2 tute elĉerpiata.

E. L. O. — Brentham. — Ni kondolencas k dankas vin pro via valoro helpe. Flaman saluton!

G. N. — Stockholm. — Via ŝata letero bone alvenis. Ĝi entenas amarajn k trafajn pensojn. Ni nun pristudas planojn, sameleĵ kun via propono k ĝustatempe ni komunikos al vi la rezultaton. Tradukitaĵojn el gazetoj ni ricevis, konstatinte refoje vian agemon. Danke ni salutas vin plej kore.

M. K. B. — Ufa. — Ricevinte vian leteron sen dato, la 9. Novembro, ne eblis komplezi vin akurate. Dankon pro via sindono k intereso.

M. D. F. — Villanueva de la Serena. — En nia numero 21-22, dato 1. Septembro ni kvitanĉias vian mensendon en fako «Nia Municio». Amikan saluton!

R. R. Dummerline. — Pardonu nian silenton en ĉi tiu rubriko, ĉar ni ne konfirmis la ricevon, esperante preligi leteron pli frue. Baldaŭ vi havos ĝin, responde al la via, pro kiu ni sincere dankas. Ni salutas vin popolfrente.

INFORMEJO

ONI SCIVOLAS PRI:

K-do Ebert Izidor. Lia antaŭa adreso estis: Socorro Rojo, Chambre 104, Albacete. K-do. Jozejo Anglada, calle Sijer, num. 1, pral., Barcelono.

KORESPONDADO

Simpla trilinea anonceto 4 f. fr.

ANGLIO. — K-do S. R. Marshall, «La Castla», Biggin Hill, Kent, dez. kor. kun socialistoj en Sovetio, Hispanio, Ĉinio, Ĉeĥoslovakio, Japanio, Meksikio k Francio.

HISPANIO. — Juna militmaristo dez. kor. kun Nord-Amerikaj junuloj, p. ĉ. t., nepre respondo. Adr.: Manuel Bori, Capitania General, Cartagena.

FRANCIO. — K-do. Carlos Lyaud, 6 Allée Mozart, Mendon. (Seine-et-Oise) dez. kor. kun Esp-istoj ekster sia lando.

FRANCIO. — Junpopolfrontano dez. kor. kun ĉiulandaj junpopolfrontanoj. Nepre respondo. Francis Qué. «Les Haies». Dammarie sur Loing (Loiret).

ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono

GUSTAVE FARENC

55, Rue Brise-Pain

Poŝtekonto 15944 Orleans

ORLEANS (Loiret) FRANCIO

ANGLIO. — K-do O. MELTON. — 25 Fowler Str. Nechells, BIRMINGHAM 7

SVEDIO. — ARBETAR ESPERANTISTEN. — Barnhusgatan 8 ŝ. g. n. b.,

Poŝtigiro n.º 55411, STOCKHOLM

BELGIO. — K-do M. DELFORGE. — 55, Rue de Heigne,

Poŝtigiro 199106, CHARLEROI

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)

NEDERLANDA ADRESO

nur por mono de holandanoj

PETRO van der PLANK

Van Speijkstraat, 48-1

poŝtigiro 245542

AMSTERDAM W. Nederlando